# SVISA ESPERANTO - SOCIETO
## INFORMAS

N-ro 1/1994 JANUARO-FEBRUARO

### ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH




FOTO R. ERNST.

La eks-prezidanto kaj la plej juna Esperantistino en Svislando, Linda-Miĥaela Weidmann, filineto de la nuna prezidanto.

## ĜENERALA KUNVENO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO 1994

Ĝi okazos la **12an de marto 1994**, 11h00-12h30, en la **Stacidoma Bufedo de la urbo OLTEN.**

### Tagordo

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno (aperinta en SI 3/1993).
b) Raporto de la Centra Komitato de SES (aperos en SI 2/94).
c) Financa raporto.
ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj.
d) Raporto de la komisionoj.
e) Elektoj (de la prezidanto, de du pliaj komitatanoj, de kaskontrolantoj, ktp.)
f) Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro.
g) Proponoj (por esti publikigebla en organo de SES kaj poste diskutebla en la kunveno, propono devas alveni ĉe la sekretario almenaŭ du monatojn antaŭ la koncerna kunveno. Ĝi estu subskribita de almenaŭ tri voĉdonrajtaj membroj).
ĝ) Diversaĵoj.

Post la ĝenerala kunveno okazos komuna tagmanĝo en la stacidoma bufedo, kaj planiĝas distra-kultura posttagmezo. Detalaj informoj aperos en la venonta eldono de SES INFORMAS.

Adreso de la sekretario de SES: Andy KÜNZLI, CP 779, 2301 La Chaux-de-Fonds. Tel. 039/26 74 07. Fakso: 039/26 62 03.

## SES-KOTIZOJ 1994, ALVOKO DE LA KASISTO

Por 1994 la ĜENERALA KUNVENO 1993 decidis altigi la kotizojn je proksimume 20%.

En tiu-ĉi eldono de SES INFORMAS vi trovas enpagilon por pagi vian kotizon.

Sed kompreneble ankaŭ donacoj estas ĉiam bonvenaj!

Pro tio bonvolu nepre ĉiam indiki sur la enpagilo, kion vi pagas, ekz.:

"Kotizo por 1994" aŭ
"Donaco" ktp.

KOTIZOJ: (inkluzivas abonon al LITERATURA FOIRO kaj SES INFORMAS)

| | |
|---|---|
| Infanoj ĝis 18 jaroj | SFr.6.- |
| Junuloj ĝis 26 jaroj | 35.- |
| Emeritoj, Pensiuloj | 35.- |
| Geezoj emeritaj | 55.- |
| Ceteraj membroj | 60.- |
| Geedzoj | 90.- |
| Abonantoj sen membreco | 35.- |

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj pere de baldaŭa pago subtenas niajn klopodojn servi al vi.

Via kasisto: E. von MAY

ooOoo

## G R U P A J   I N F O R M O J

**BELLINZONA**

15.1.17.00h en Viale Motta 32

**ESPERANTO-SOCIETO BERN**

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
4.1.19.30h kaj 1.2.19.30h.

**ESPERANTO-RONDO BIEL**

En restoracio AMI, Freie Strasse 8.
18.00-19.00h ĉiun vendredon-

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE**

En Popoldomo, Place Chauderon 5.
10.1.20.30h Pierre-Marie Charrière prelegos pri: Dieto, fasto, natura kuracado.
7.2.20.30h ĝenerala kunveno.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO**

En restoracio SIMPLON, Habsburgerstrasse 16
27.1.19.30h paroliga leciono.Gvido Franz Brügger
20.00h libera babilado
2020-20.45h interŝanĝo de informoj, poste priparolo de la jarprogramo 1994.
24.2.20.00h ĝenerala kunveno.(Kiu ŝatos vespermanĝi, tiu venu je 18.30h)

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL**

ĉiumonate iun vendredon,laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL**

Atentu: Pro renovigo de la restoracio, Januaro, februaro kaj marto 1994 ne okazos renkontiĝoj.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH**

10.1.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse.
24.1.19.00h Libera kunveno ĉe familio Weidmann.
14.2.19.00h ĝenerala kunveno en Karl der Grosse.

oo0oo

## SES GRATULAS !

### Andrée GACOND-GIROUD - 60-jara !

Romandino naskita la 25an de julio 1933 en La Chaux-de-Fonds (NE). La iama instruistino - interalie ŝi instruis fluton en la muziklernejo de La Chaux-de-Fonds - kiu longe vivis en La Sagne (NE), ekde 1958 estas la edzino de s-ro Claude Gacond, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Ankaŭ ŝia fratino, s-ino Cosette Cop-Giroud, same loĝanta en La Chaux-de-Fonds, estas tre bona esperantistino.
Andrée Gacond eklernis Esperanton en 1952 kaj iom post iom aliĝis al la movado partoprenante kaj kungvidante la agadon de la Junularsekcio de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj de Esperanto-Junularo de Svislando (EJS). En la 1950-70aj jaroj ŝi kunorganizis ankaŭ la esperantajn skiferiojn en Adelboden (BE), malkovrinte taŭgan restadejon (ĉaleto) por ili. Dum ĉiuj tiuj okazoj ŝi kontribuis pianludante, prezentante teatraĵeton (ekzemple dum la SES-tago en 1956), mastrumante kaj raportante en 'Svisa Espero'. Ekde la kreo de 'Centro de dokumentado kaj esploro pri la lingvo internacia' (CDELI) en 1967 ŝi regule kunlaboras en ĝia ampleksa arkivada taskaro. 1968-1990 ŝi merite prizorgis ankaŭ la libroservon de Kultura Centro Esperantista (KCE). Krome, 1963-1992 ŝi regule kunrealigis la Esperanto-disaŭdigojn de Svisa Radio Internacia (SRI) laŭtlegante la tekstojn verkitajn de sia edzo kaj eĉ redaktante la elsendojn, kiam li malsaniĝis. Okaze de ekskursoj tra la naturo, Andrée Gacond ĉiam impresas la aliajn pro siaj nekutime detalaj konoj de la esperantaj nomoj de plej diversaj plantoj.

**Ni tre kore gratulas nian simpatian jubileantinon kaj deziras al ŝi ĉion bonan en la estonto.**

ooOoo

## NEKROLOGO

En 'SES informas', 4/1993, p.4, aperis la anonco pri la bedaŭrinda morto de d-rino **Tina PETER-RÜETSCHI.** Intertempe, Andy E. KÜNZLI, redaktoro de la leksikono-enciklopedio 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando', rilatis kun ŝiaj parencoj. Li rikoltis kelkajn aldonajn informojn pri la forpasintino kaj kompilis la sekvantan biogramon.

### PETER-RÜETSCHI Tina

Alemanino naskita la 15an de decembro 1904 en Zuriko, mortinta la 3an de majo 1993 en la zurika kliniko Balgrist, pro la sekvoj de koksoperacio. Sian junaĝon ŝi pasigis ĉe la zurikurba strato 'Zeltweg' (poste ŝi ĉiam loĝis ĉe Blümlisalpstrasse) kaj finis la lernejon en Fetan (GR) per la abiturientiĝo. Komence de la 1930aj jaroj ŝi ekstudis juron ĉe la zurika universitato, kiun ŝi konkludis per doktoriĝo (fako: junulara punleĝaro). Poste ŝi ekfunkciis ĉe la junulara tribunalo en Vinterturo (ZH). Dumvive, ŝi okupiĝis intense pri la problemoj kiel konservadi la svisan civitanecon ĉe svisinoj edziniĝintaj kun eksterlandano; ŝi ankaŭ serĉis solvon koncerne la loĝejetaĝan posedecon en Svislando kaj tiurilate publikigis gravan kajeron ankoraŭ nun deziratan. Krom tio ŝi tre interesiĝis pri la demandoj de la mediprotektado, pri politiko, arto, muziko, ĝardenumado, ktp., ŝatis vojaĝi kaj regis plurajn lingvojn. Ofte ŝi partoprenis diversajn kongresojn en Svislando kaj eksterlando kaj estis delegitino de la Liberala Partio. La tagĵurnalo 'Neue Zürcher Zeitung' daŭre publikigis ŝiajn analizemajn artikolojn. En 1927 ŝi edziniĝis kaj poste naskis 3 infanojn.

Kiel E-istino Tina Peter estis multjara aktiva membro de SES kaj de la zurika ES, kies honora membro ŝi estis de 1989). Internacian bonfamon en la E-movado ŝi rikoltis, kiam en 1951 ŝi enkondukis la t.n. koordinitajn E-kursojn (KEK) en la zurika

popolaltlernejo, kiuj daŭris ĝis 1961. La instrumaterialon prilaboris krom Tina Peter mem ankaŭ |v| Fritz Liechti kaj |v| Werner Laederach, kiu gvidis tiujn kursojn. La koordinitaj kursoj kun la samaj instrutekstoj efektiviĝis samtempe ankaŭ en Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Italio, Nederlando kaj Svedio kaj spertis rimarkindan sukceson. Kvankam Peter kutimis labori malantaŭ la kulisoj, ŝiaj meritoj por E-o rekoniĝis en ĉiu partoprenanta lando.
(fontoj: SES informas, 4/1993, p.4; Inf. ESZ/Liechti, 1993, letero kun nekrologo de Eugénie Peter, Zürich, al A.Künzli, de la 30a de junio 1993).

oo0oo


**EN PROPRA AFERO**

Jam pluraj dissendoj de SES INFORMAS okazis laŭ la nova sistemo, sen kovertoj. Nun subite atingas vin nia informilo ree en koverto. Kial do, vi eble demandas vin?Elprenante la enhavon vi tuj rimarkas, ke diversaj aĵoj enestas. Unuflanke, en la nova sistemo oni ne povas aldoni ion, pro la elfalo dum la transporto. Aliflanke,KCE demandis, ĉu ili povus ankaŭ aldoni sian monatan bultenon. Kial ne?
Plue enestas ankaŭ aliĝilo por la venonta Universala Kongreso de Esperanto en SEULO/ Koreio. Oni vere povas demandi sin,kial ne kune sendi, se temas pri pluraj samtempaj aĵoj? Do, jen la kaŭzo de nia hodiaŭa sendaĵo.
Do, vi ĉiuj fartu bone kaj ĝuu agrablan novan jaron. -FL-

oo0oo

La Germana Esperanto-Asocio
invitas vin paske
01/04/ - 08/04/1994
al familia feriado en
Jünkerath/Eifel
Germanio

## 10a PSI
## ne nur por familioj!



# Printempa Semajno Internacia

La aranĝo estas precipe familia seminario. La programo kontentigu egalrajte plenkreskulojn kaj infanojn. Ankaŭ ne-esperantistaj familianoj kaj komencantoj estas tre bonvenaj. Plejparte la programeroj dependos de la fantazio kaj bezono de la partoprenantoj. Do, estas bonvenaj ĉiuj ofertoj kaj proponoj pri manlaboro, muzikumado, teatraĵoj, naciaj kaj internaciaj ludoj, interesaj prelegoj ktp.
La organizantoj zorgos pri interesa turisma programo kaj kompreneble pri diversnivelaj Esperanto-kursoj. Plena programo kun aliĝilo estas havebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Bonvolu aldoni afrankitan,al vi adresitan koverton. Dankon. -FL-

oo0oo

## "Nur 10jara, sed jam tradicia !

## La Printempa Semajno Internacia (PSI) de Germana Esperanto-Asocio festos sian 10jaran jubileon

*La 10a internacia familia semajno okazos inter la 1a kaj 9a de aprilo 1994 en la urbeto Junkerato (Jünkerath) en la germana regiono Ejfelo tuj apud la landlimo al Belgio kaj Luksemburgio.*

Detaloj estas en SES INFORMAS n-ro 6/1993.

oo0oo

Korespond-PETO

Mi estas komencanta Esperantistino, kiu volus korespondi kun diverslandanoj por praktiki la lingvo-uzon kaj volus havi geamikojn en diversaj landoj.Mi aĝas 40 jarojn kaj mi estas edzino.
Mi interesiĝas pri fremdaj lingvoj, literaturo, muziko, orienta medicino, jogo, metitado, psikologio, kiel ankaŭ komputiloj.
Zuzanna Jeziorska, ul. Biedronkowa 17/39
PL-91-358 Lodz, Pollando.
Antaŭdankon por ĉiu respondo.

oo0oo

Ŝ E R C O (La terura gramatiko!!)

Post festotago la lernantoj en la lernejo ricevis la taskon skribi, kio okazis dum la festotago. Lernanto skribis: En nia komunumo oni hieraŭ inaŭguris la novajn sonorilojn de nia preĝejo. La pastro kaj la komunuma prezidanto tre interese prelegis kaj poste oni pendigis ilin (nature la sonorilojn) kaj nun estas tre agrable kaj hejmece en nia komunumo!

oo0oo

## RERIGARDO AL LA ELDONO DE SES INFORMAS EN 1993

Certe estas interese ĵeti rigardon al la eldono de SES INFORMAS/SI en la ĵus pasinta jaro. Komparante la situacion de la komenco ĝis nun, oni povas konstati, ke la amplekso iom post iom kreskis. Helpis al tio ankaŭ gesamideanoj per valoraj kontribuaĵoj.
En la lasta jaro mi klopodis, sur 120 paĝoj, prezenti informilon kun varia enhavo. Certe ne ĉiam estis facile kunmeti al ĉiu plaĉantan numeron. Tamen, laŭ la ricevitaj opinioj oni povas konstati, ke ĝenerale la legantoj estis kontentaj.
La kunlaboro kun la Svisaj Esperantogrupoj estis grandparte kontentiga. Estas nur domaĝe, ke kelkaj grupoj ne havigas sian kompletan programon, ĉar ili evidente ne pripensas, ke SES INFORMAS aperas ĉiam por du monatoj. Tial aperas en SI nur la indikoj por unu monato. La redaktoro dankas al ĉiuj, precipe al tiuj, kiuj disponigas tutjaran programon.
Estas ankaŭ ĝojige, ke eksterlandaj societoj interesiĝas pri nia informilo, kiel ekzemple la Esperantomuzeoj de Vieno kaj Barcelono,la japana TEK, UEA kaj en Bern la biblioteko de Svislando ktp. Certe ne malbona signo.
Mi esperas, ke la kunlaboro en la nova jaro estu same kontentiga. Miaflanke mi klopodas fari la plej eblon, ke SES INFORMAS ankaŭ en 1994 trovu la intereson de la legantoj.
La nova dissendmaniero sen kovertoj, nun bone funkcias. En la komenco montriĝis kelkaj malfacilaĵoj, sed finfine ĉiu nova sistemo postulas alkutimiĝon!. La laboro estas pli ampleksa, sed aliflanke por la SES-kaso donas bonvenan malpliigon de la afranko-elspezoj.
Plua faktoro estas konstatebla. La membraro estimas la akuratan aperon de nia informilo.

Via redaktoro FL.

oo0oo

# SVISA ESPERANTO-SOCIETO

## CENTRA KOMITATO (CK)

### ESTRARO

Prezidanto:
s-ro Claude GACOND, Chevreuils 14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds (NE). Tel. (039) 26 52 32.
Unua vicprezidanto kaj ĉefredaktoro de "SES-informas":
s-ro Fritz LIECHTI, Wiesliacher 17, 8053 Zürich. Tel.01/381 77 13.
Sekretario:
s-ro Andy E. KÜNZLI, Zumhofstrasse 22, 6010 Kriens (LU). Tel. (041) 45 55 83.
Kasisto:
s-ro Ernst VON MAY, Flurstrasse 3, 9242 Oberuzwil (SG). Tel. (037) 51 61 30.

### ALELEKTITAJ CK-anoj

Regionaj vicprezidantoj:
Germanlingva: s-ro Angelo MELLINI; Büntacher 21, 5626 Hermetschwil (AG). Tel. (057) 33 33 85. Oficejo Lucerno: (041) 57 01 11.
Franclingva: f-ino Nicole MARGOT; 28, ch.des Lys 4 1010 Lausanne (VD). Tel. (021) 24 11 93.
Itallingva: d-ro Tazio CARLEVARO; Viale Giuseppe Motta 32, 6500 Bellinzona (TI). Tel. (092) 25 29 88.
Ceteraj komitatanoj:
s-ino Mireille GROSJEAN-ROBERT, 20, rue du Temple, 2426 Les Brenets (NE). Tel. (039) 32 18 88. (Ligo kun GEP/KCE).
f-ino Marion GROSJEAN; 20, rue du Temple, 2426 Les Brenets (NE). Tel. (029) 32 18 88. (Junularo)
s-ro Fritz WASSMANN; Uettligenstr. 16A, 3033 Wohlen (BE). Tel. 031 82 27 55. (Eksteraj rilatoj, ekologio)

ooOoo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
Red. Telefon 01/381 77 13

E D Z I Ĝ O

En junio 1993 la SES+KCE-Sekretario, Andy Künzli, edziĝis. Lia edzino estas Sinjorino Tamara Burjaĉok el Kievo/Ukrainio, kie okazis la geedziĝfesto.

Ni ĉiuj ĝojas pri tio kaj deziras al la nova paro ĉion bonan, feliĉon kaj sanon en la estonteco.

SES kaj la redakcio de
SES INFORMAS/FL

oo0oo

Ĝ E N E R A L A K U N V E N O D E S A E F

SVISA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

La ĝenerala kunveno de SAEF okazos sabate la 12-an de marto 1994, 09.30-11.00h, en kunvenejo de la stacidomo en O L T E N.

OOOOO

Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 2/1994 estas la 7-a de februaro 1994.